

LOKA KLUBO DE ĈEA

n-ro 4/1992

septembro 1992

Enhavo: J. Mařík – honora membro de UEA (1)
La 77-a Universala Kongreso en Vieno (2)

Somera Esperanto-Tendaro en Lančov (3)
Programo de la klub-kunvenoj (3)
Ni legis... (4)

S-ano Jaroslav Mařík – honora membro de UEA

Dum la nunjara Universala Kongreso en Vieno la Komitato de UEA decidis atribui Honoran Membreco de UEA al kelkaj meritplenaj personoj, i. a. al s-ano Josef Vondroušek pro lia granda literatura kaj organiza laboro, kaj al la honora prezidanto de nia klubo s-ano Jaroslav Mařík, honora membro de ĈEA, dumviva membro de SEA.

S-ano Jaroslav Mařík naskiĝis la 22-an de decembro 1913 kaj jam en la jaro 1929 li ekinteresiĝis pri Internacia Lingvo. En 1935 li fariĝis membro de Esperanto-Asocio de Ĉs. Respubliko kaj ekde tiam li estis tre aktiva en la movado kiel instruanto, organizanto, funkciulo, delegito, redaktoro (en la jaroj 1946-50 profesia redaktoro kaj parolisto de la ĉiutagaj Esperanto-elsendoj de Radio Praha), redaktanto de bultenoj, komitatano, prezidanto de Esperantista Klubo en Prago, estrarano de ĈEA, verkisto kaj tradukisto, „maranta enciklopedio pri la Esperanto-movado“.



La honorigito akceptu niajn gratulojn kaj dezirojn de firma sano kaj konstanta humoro por la poresperanta agado.

La Antaŭkongreso de la 77-a UK sukcese okazis en Prago. Cento da partoprenantoj admiris nian ĉefurbon, i. a. la Fontanon en la ekspoziciejo, partoprenis aŭtobus- kaj ŝip-ekskursojn kaj merkrede la 22-an de julio la Komeniologian konferencon honore al la 400-jara naskiĝdatreveno de elstara pedagogo kaj pioniro de la ideo de internacia lingvo J. A. Komenio. La konferenco okazi sen la Kavalira salonego de la Valdštejn-palaco, la sidejo de ministerio de kulturo. La ĉeestantojn alparolis vicministro pri kulturo kaj poste sekvis prelegoj pri Komenio fare de D-rino Věra Barandovská-Frank el Universitato Paderborn, Germanio, Prof. D-ro Vlastimil Novobilský, CSc., el Universitato J. E. Purkyně en Ústí n. L., Ĉeĥoslovakio, kaj Prof. Giordano Formizzi el Universitato Verona, Italio. Post la prelegoj sekvis vizito al la Pedagogia Muzeo de Komenio en la sama palaco. Vespere okazis Solena Muzika Vespere, en kiu esperantlingve operariojn kantis operkantistoj H. Halířová, V. Halíř, K. Kudlíková kaj M. Smyčka.

EN VIENO – LA 77-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN VIENO – LA 77-a

La 77-an Universalan Kongreson en Vieno partoprenis pli ol 150 geesperantistoj el Ĉeĥoslovakio. El ili trideko vojaĝis ĉiutage al Vieno el Lančov, kie ili loĝis.

Dum la inaŭguro de la kongreso oni legis la mesaĝon, kiun al la kongreso sendis la aŭstria federacia prezidento Thomas Klestil, kiu esprimis sian simpatian al Esperanto.

La mesaĝo de la Alta Protektanto de la UK Heinz Fischer, prezidanto de la aŭstra parlamento, enhavis dezirojn, ke Esperanto estu ideo por la XXI-a jarcento.

La ĝenerala direktorko de la Aŭstra Nacia Biblioteko s-ino Magda Strelb salutis la kongreson nome de la Ministerio pri Scienco kaj Esploro.

Persone alparolis la kongreson ankaŭ la estro de la Viena UNESKO-Komisiono, s-ro Mornadou Seck, kiu substrekis la similecon inter la klopodoj de UNESKO kaj UEA.

Anglalingvan bondeziran leteron al la kongreso sendis la ĉefministro de Nov-Zelando Jim Bolger.

La kongreson ĉeestis persone aŭ salutleteron sendis multaj ambasadoroj kaj aliaj reprezentantoj. Oni menciis ankaŭ leteron de ĉeĥoslovaka ambasadoro s-ino Magda Vašáryová.

Bedaŭrinde, inter la multnombraj reprezentantoj de unuopaj landaj asocioj salutantaj la kongreson mankis la reprezentanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

La ĉefan paroladon dum la inaŭguro de la 77-a UK prezentis s-ro Louis C. Zaleski-Zamenhof, la nepo de aŭtoro de Esperanto.

Sabate, la 25-an de julio je la 17-a horo, en Karlsplatz, centra placo de Vieno, okazis inaŭguro de Esperanto-parko, kien oni translokigis ankaŭ la Zamenhof-buston, kiu ĝis tiam troviĝis en la parko malantaŭ la Viena Borso.

Estas elektita nova estraro de UEA:

Prezidanto: D-ro John Wells – kunordiganto kaj reprezentanto

Ĝenerala sekretario: Ian Jackson – strategia planado

Estraranoj: Ulrich Lins – landa kaj regiona agado

Mark Fettes – informado, eksteraj rilatoj kaj CED

Hans Bakker – financoj

So Gilsu – azia agado

Michaela Lipari – kongresoj kaj kulturo

En la Belartaj Konkursoj de UEA 1992 la premion „Luigi Minnaja“ gajnis Inĝ. Jan Werner pro la eseo „Ĉu konflikto inter vorto kaj nocio?“

RADIO-REZOLUCIO

Reprezentantoj de diversaj radio-stacioj utiligantaj Esperanton kaj aŭskultantoj de tiuj stacioj, kunsidantaj dum la 77-a Universalan Kongreson de Esperanto en Vieno (24 julio – la aŭgusto)

- diskutinte la aktualan situacion de la esperanto-programoj kadre de kurtondaj radiostacioj;

- konstatinte, ke pluraj radiostacioj, precipe Pola Radio (Varsovio), Svisa Radio Internacia (Berno), Radio Zagrebo (Kroatio) draste reduktas aŭ eĉ ĉesigas sian Esperanto-programon;

- forte bedaŭras la decidon de la estraroj de la supre menciitaj radiostacioj;

- opinias, ke Esperanto-elsendoj daŭre estas alloga kaj grava rimedo por la internacia komunikado, precipe en la nuntempo, kiam oni alstrebas la kreon de nova internacia ordo;

- estas konvinkitaj, ke Esperanto estas vaste ŝatata lingvo por informi la internacian publikon pri la eventoj en la koncernaj landoj;

- emfazas la fakton, ke ĉefe en orienta Eŭropo daŭre estas forta deziro ricevi objektivan informadon el aliaj mondopartoj, kiun garantias la Esperanto-lingvo;

- petas la supre menciitajn radiostaciojn revizii sian decidon kaj reenkonduki Esperanton;

- rekomendas al nove sendependiĝintaj ŝtatoj utiligi Esperanto pere de la propraj radiostacioj.

Letní esperantský tábor v Lančově

Somera Esperanto-Tendaro en Lančov

Letošní Letní esperantský tábor v Lančově skončil a my se už teď těšíme, že dá-li nám Pán Bůh zdraví, pojedeme příští rok zase.

Byly to opravdu kouzelné dny prožité v prostředí krásných, hlubokých lesů u Vranovské přehrady v péči esperantských vedoucích – učitelů, kteří každé dopoledne svědomitě zdokonalovali naše jazykové znalosti.

Není snadné v krátkém článku vylíčit podrobně pohodu celého pobytu, ale přece jen se musíme zmínit o výborné stravě, kterou připravovaly sympatické kuchařky a o bezvadné organizaci všech akcí. Mezi jinými byli jsme na zájezdu ve Vídni, kde jsme navštívili Esperantské muzeum.

Ukončení letošní sezony bylo slavnostní, protože je 40. Výročí založení Esperantského tábora v Lančově a oslav se zúčastnilo mnoho funkcionářů esperanta z celé republiky.

Přejem vedení Esperantského tábora v Lančově hodně úspěchů a spokojených táborníků a věřme, že se příští rok ve zdraví a v hojném počtu opět shledáme.

Vaše spokojené tábornice

Maudrová, Bínová

La ĉi-jara Somera Esperanto-Tendaro en Lančov finiĝis kaj ni jam nun antaŭĝojas, ke se Sinjoro Dio donos al ni sanon, ni veturos venontjare refoje.

Estis vere sorĉplenaj tagoj travivitaj en la medio de belegaj, profundaj arbaroj ĉe la Vranova baraĵo sub zorgo de Esperantaj gvidantoj – instruistoj, kiuj ĉiun antaŭtagmezon konsciencie perfektiv niajn lingvosciojn.

Ne estas facile ne mallonga artikolo priskribi detale la serenon tempon de la tuta restado, sed ni tamen devas mencii la eminentan manĝaĵon, kiun preparis la simpatiaj kiuristinoj, kaj la sendifektan organizon de ĉiuj nadoj. Ni partoprenis – inter aliaj – ekskurson en Vienon, ke ni vizitis la Esperanto-muzeon.

La finiĝo de la nunjara sezono estis solena, ĉas estas 40-a datreveno de la fondo de la E-Tendaro en Lančov kaj la solenaĵojn partoprenis multaj funkciuloj de Esperanto el la tuta respubliko.

Ni deziras al la estraro de la E-Tendaro en Lančov multajn sukcesojn kaj kontentajn tendaranojn kaj ni esperu, ke venontjare ni sanaj kaj multnombraj denove revidiĝos.

Viaj kontentaj tendaraninoj

Maudrová, Bínová

La programo de kunvenoj de la klubo:

- | | | |
|--------|--|----------------|
| 7. 9. | Libera tribuno + kantado | - ĉiuj |
| 14.9. | Krokodiloj kaj parencaj bestoj | - R. Howard |
| 21.9. | El preparata kolekto: Vino – viroj – kanto (legas la aŭtorino) | - E. Urbanová |
| 28.9. | Somera tendaro en Lančov | - H. Maudrová |
| 5.10. | Pragaj legendoj | - J. Mařík |
| 12.10. | Popido – verda dialekto | - R. Howard |
| 19.10. | J. A. Komenský | - J. Mráz |
| 26.10. | Japanio en bildoj | - V. Piščíková |
| 2.11. | Sur la vojoj de la Analiza Skolo | - J. Patera |

La programo de ekskursoj de la klubo:

- 19.9. Roztoky – renkontiĝo je la 9-a h en Masarykovo-stacidomo
- 3.10. La Praga „Semering“ – renkontiĝo antaŭ la 11.23 h en la Smíchov-stacidomo, norda perono (tram-stacio Plzeňka)
- 17.10. Hrusice – renkontiĝo en la ĉefa stacidomo je la 9-a h
- 7.11. Kalštejn – renkontiĝo je la 9-a h en la Smíchov-stacidomo

La kunvenoj de la klubo estas ĉiulunde ekde la 17.30 h en la klubejo en Vejvodova-strato.

La komitato de la klubo dankas al s-anino Cíhová pro ŝiaj pluaj valoraj librodonaĵoj.

Ni dankas al ĉiuj afablaj donacintoj de mono, kiuj helpis al nia kluba kaso. Tuj donacoj estis aparte malavaraj, koran dankon!

Ni legis...

Deveno de la ruĝa stelo

Dum la unuaj jaroj de la Soveta respubliko la ĉefo de RMK (revolucia milita konsilio) estis L. D. Trockij. Dum unu el kunsidoj de RKM li turnis atenton al surbrusta insigno de konsiliano N. V. Krylenko. Krylenko estas tiu sama maristo, kiu pafis el „Aŭroro“ al la Vintra palaco, kaj poste laboris en Komisariato de justico. Post la kunsido Trockij aliris al N. V. Krylenko kaj demandis lin pri la insigno, kiu estis esperantista stelo.

Nikolaj Krylenko estis ano de Petrograda rondeto „Espero“ kaj ĉiam surportis ĝian insignon. Li rakontis al L. D. Trockij pri la Sobolo de esperantistoj. Al la prezidanto de RMK ekplaĉis la formo (5-angula stelo – kvin kontinentoj), sed ne la koloro (verda – la koloro de espero). Li diris, ke soveta armeanoj de nun havos similan signon – kvinangulan stelon, nur de ... ruĝa koloro (koloro de verŝita sango).

Tiel la esperantista verda stelo naskis la ruĝan stelon – simbolon de komunismo.

A. Koba
(el Konkordo Internacia)

Tradukoj el Esperanto

La originala krimromano de Deck Dorval (Frans Van Dooren) „Kazinski venas tro malfrue“ aperis en 1990 en hungara eldono en 30 000 ekzempleroj, kio pozitive surprizis la esperantistaron. Nun la sama romano, tradukita al la pola fare de Wojciech Usakiewicz, aperis ankaŭ en 30 000 ekzempleroj ĉe Epoka, Varsovio. Ne okazas ofte, ke Esperanta literatura verko atingas tian sukceson kaj konatecon en aliaj lingvoj.

(el Venezuela Stelo)

Zájemci o kurs esperanta pro začátečníky se mohou přihlásit na adrese našeho klubu (viz níže vlevo).
Cena kursu včetně učebnice je 200,-- Kčs.

B U L T E N O

Věstník Klubu esperantistů v Praze

Vydává Klub esperantistů v Praze,
složka Českého esperantského svazu
pošt. schr. 1069
111 21 PRAHA 1